



# Okdek-anoj Ĉe l' Papero

Nova eldono 2006 • n-ro 19a

La gazeto de la membroj de l' asocio Esperanto 80

Oktobro 2005 > Januaro 2006

Le journal des membres de l'association Esperanto 80

Réunions conviviales!  
Gastaj kunvenoj!

## Réunion Conviviale - Gasta kunveno

### N'oubliez pas de venir


à la réunion conviviale qui aura lieu :

**le Vendredi 6 Janvier 2006 dès 19h30, salle des Tilleuls à Salouël (derrière la Mairie).**

Surtout n'oubliez pas de téléphoner à Daniel au 03 22 47 30 11 :

**avant le dimanche 29 janvier 2006 au soir pour qu'il fasse une commande le lundi** (voir à ce sujet les « Lastaj novaĵoj : la vivo de nia grupo » en bas de la page 2).

La réunion conviviale suivante aura lieu le vendredi 3 février 2006.



## Bonne année 2006 et tout le toutim ! Bonan jaron 2006 kaj ĉion ceteran !

Saluton!! Revoici donc après un trop long silence un numéro d'**Okdek-anoj ĉe l' Papero**.

Comme d'hab l'un de mes défauts revient au premier plan : je suis adepte de la « procrastination ». Vous me direz, qu'est-ce que la « procrastination » ?

En fait j'en ai entendu parlé la première fois lors d'une émission de jeu sur France 2. Un homme se disait aussi *adepte de cette chose* qui pouvait sembler ne rien vouloir dire aux non initiés c'est-à-dire à ceux qui n'avait jamais fait de latin... ou d'espéranto.

Aussi bizarre que cela puisse paraître j'ai sans avoir fait de latin compris de quoi il s'agissait. En effet, en espéranto il existe le verbe « prokrasti » qui signifie *repousser quelque chose à plus tard, ajourner, renvoyer au lendemain, renvoyer, remettre*. En latin on trouve « procrastino » qui est l'action, le verbe, et « procrastinatio » qui est le substantif né du verbe, c'est à dire *ajournement, remise (au lendemain), délai* - en espéranto « prokrasto ».

Depuis que j'ai découvert ce mot par le biais de l'espéranto, je me suis défini comme un « prokrastulo », c'est-à-dire une de ces personnes qui ont tendance à repousser les échéances, et en français on dirait donc : un *procrastinateur*. C'est donc remotivé, ma nature de *procrastinateur* combattue qui me font finir ce **Okdek-anoj ĉe l' Papero** numéro 19.

Maintenant la question est : à quoi est dû cette soudaine crise de procrastination ? Les facteurs sont multiples. Vraisemblablement des raisons personnelles... d'autres choses dans la tête, soucis ou espérances, on repousse les échéances et puis parfois la procrastination ne se justifie pas : elle est, c'est tout !

Oh... zut !

Il ne me reste même plus une ligne complète pour vous souhai-

Cyrille

Saluton!! Jen denove post tro longa silento alia numero de **Okdek-anoj ĉe l' Papero**.

Kiel kutime unu el miaj difektoj revenas ĉe la fronton : mi estas adepto de « prokrasto »-konduito. Vi demandos min : kio estas tio ? Fakte mi unue aŭdis pri tio dum lud-televid-elsendo far la franca kanalo « France 2 ». Iu viro priskribis sin ankaŭ kiel adepto de « procrastination » (prokrasto-adepto). Tio ŝajne nenion signifas por tiuj, kiuj ne estas iniciatitaj pri la lina lingvo aŭ pri... Esperanto. Eĉ se tio povus aperi freneze, mi tuj komprenis, kvankam nelerninte la latinan, la temon de la diritaĵo.

Fakte en esperanto ja ekzistas la vorton « prokrasti », kiu signifas ( tie mi forlasas la tradukojn , ĉar tempo mankas al mi...).

En la latina lingvo oni trovas « procrastino », kiu estas la agado, la verbo kaj « procrastinatio », kiu esta la o-vorto el la verbo...

Ekde la malkvoro far mi de la vorto per nia lingvo Esperanto, mi difinis min, kiel « prorastulo », t.e. persono, kiu emas forpuŝi tempojn kaj gravajn aferojn. En la franca oni dirus « procrastinateur ».

Reviglitaj kaj agema, pro mia prokrasto-emo kontraŭigita, mi nun kapablas fini la en viaj manoj 19an **Okdek-anoj ĉe l' Papero**.

Nun restas demando : pro kio ekesto de prokrasto-emo ? Kialoj estas multaj. Verŝajne pro personaj kialoj... kaj aliaj pensoj en la kapo, zorgoj kaj esperoj. Ĉiam estas facile subŝovi la templimojn, sed cetere prokrasto-emo ne havas precizajn kialojn : ĝi nur ĉeestas !

Oh... jes!!!

En Esperanto, mi havas sufiĉe da linioj por fini kaj diri al vi ion por la nova jaro 2006!!! Mi do deziras al vi la plej belan, bonan jaron, sukceson, pacon, kaj ĉion ceteran!!!!

Cyrille

La Okdekanoj Esperantistoj estas tenintaj sian ĝeneralan kunvenon tiun tagon antaŭ la monata manĝo.

Ĉestis Danielle, Vinĉjo kiu venis pli malfrue, Jean-Claude, Cyrille, Daniel, Maryse, Bernadette, kaj mi, Françoise Lemonnier kiu havas la feliĉon fari tiun ĉi raporton kun la helpo ankaŭ de la notoj de Jean-Claude, al la nobla kunveno, kiun vi formas!

La tagordo estis:

### Agad-raporto

**Jean-Claude** komencis rakonti tiojn, kiojn li enkondukis: AGORA la 19a de Septembro 2004, la venon de Marie-France Conde-Rey en la komenciĝo de Novembro, kiu estas senatanino de la Esperanta Civito. Kun lia familio, li partoprenis la NovJaran Renkontiĝon en monaĥejo supre de la rivero Mozelo. Ili renkontis multajn familiojn venintaj el malsamaj landoj (Svisio, Germanio inter aliaj).

Lia filino Chloé nun korespondas kun Olivia per Esperanto.

En Aprilo li trapasis trian nivelon de Esperanto kaj li bone sukcesis en Bouresse t.e. «Kvinpetalo».

En Julio li akceptis rusan junulinon, kiu nomiĝas Maja Loskutova.

**Cyrille** daŭrigis: li partoprenis ankaŭ en AGORA 2004 kaj dediĉis multajn horojn en farado de *Okdek-anoj Ĉe l' Papero* per sia komputilo (pri tio dankon al li multe!). Li reprenis ankaŭ la transporton kaj la prizorgon de la asocia biblioteko dum la montaj gastaj kunvenoj.

En Berseo, li trapasis duan nivelon kaj bone sukcesis, kie li iris kun Franĉeska (mi, Françoise) la 26an de Junio.

Li aĉetis la pasportservon (per 10 eŭroj) kaj prenis kontaktojn en malsamaj landoj (Pollando, Ĉeĥio, Hungario) kie li povis renkonti geesperantistojn kaj pasi bonan tempon kun ili dum du semajnoj de siaj ferioj en Aŭgusto.

Sen forgesi la kursoj, kiujn li donis kun Bernadette al la gelernantoj de Unua nivelo en Esperanto.

Cyrille komencis fari nian malfermitan TTT-ejon sur Interreto (vere mirinda tiu kara kolego!).

3) Bernadette poste ekparolis por paroli pri siaj agadoj.

Do ŝi estis kun la helpo de Cyrille la instruistino de la unua nivelo. Ĉi tiun jaron ŝi povos instrui sola se estos novaj gelernantoj laŭ la «rikolto» de AGORA 2005. Gelernantoj, kiujn Cyrille prizorgus tiam estos tiu unu-nivelaj gelernantoj de la pasinta jaro. Ŝi estis la fakistino pri la Katedralo kaj pri marbordo. Ŝi estis ĉiĉeronino de Madis-o, estono, ĉe la marbordo, en Amieno kun Régis kaj Marysa.

Madis tre interesiĝas pri ĉiaj kokoj sur preĝejoj aŭ en tombejoj!

Ŝi ankaŭ partoprenis fari la vidbendon pri turismaj aferoj de nia regiono kun Danielo kaj Mariza (dank' al Zebulon!).

Tiun ĉi someron ŝi vojaĝis kun familianoj en Litovio, kaj ĉeestis en Vilno dum la malferma tago de la ĉi-jara Universala Kongreso (kie ŝi trafis Madis-on kaj al li parolis kelkajn minutojn) kaj poste ili ĉirkaŭveturis Litovion dum tri semajnoj. Tiu ĉi lando estas malgranda. Poste ili vizitis konatojn nederlandajn: eble Aŭdra venos se ŝi bonfartos la venontan jaron.

4) Danielo parolis siavice: li partoprenis en la renkontiĝo de Morbecque kaj veturigis 5 de ni. Estis sep Esperantistoj el Amieno kiuj ĉeestis. Tre agrabla restado! Li preparis tutkore la veno de Madis invitinte multajn asociojn sed tre malmultajn personojn venis kaj li multe ĉagreniĝis kaj seniluziĝis! (ne maltrankviliĝu Danielo, ni amas vin!).

Li partoprenis al centjariĝo de la unua Universala Kongreso de Bulonjo fine de Marto 2005. Li estis surpriza kaj mirinda kompreni tutan la prelegon de Claude Piron! (brave Danielo!, ni amas vin vere multe!)

5) Maryse donis multajn kuraĝigojn al sia tre kara edzo, tial ni amas vin multe ankaŭ Marunja! (sed ne! mi ne amas nur la virojn precizigas la sekretario!)

6) Franĉeska partoprenis en la renkontiĝo de Morbecque kaj la Boulonjo-festo plezure, ŝatanta pli kaj pli lerni Esperanton kun mirindaj gesamiseanoj en Amieno.

Mi devas diri ke S-ro Longue-épée faris al mi ankaŭ tre bonan impreson pro lia afableco dum mia ekzameno en Berseo. Mi longe opiniis pri mi, ke mi ne estis sufiĉe bonnivela, hezitinta. Mi sukcesis tamen trapasi la unuan gradon.

### Bilancio financa de la kasisto Danielo

Pri tiu subjekto, li disdonis la tabelon de la eŭroj eniritaj kaj eliritaj.

Notu ni, ke restas pli da mono ol ni elĉerpis, ĉar ni planis akcepti, sed ne povis veni la Zef Jégard, kiu estus venonta por paroli pri siaj vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo, la 14an de Oktobro, sed ve li tre malsaniĝis. Niaj pli bonaj deziresprimoj al li por bona resaniĝo! La Kunveno decidis daŭrigi la kotizon de 20 eŭroj kaj la prezo de la manĝo okazonta ĉiun unuan vendredon de ĉiu monato restas je la prezo de 10 eŭroj.

### Elekto de la nova estraro de nia asocio

Unuanime estis elektitaj:

- Cyrille la nova prezidento
- Danielo restas kasisto (Tasko nedankema kaj enuiga! Dankon al li!)
- Franĉeska (mi) estas la nova sekretariino riske de via famo!!!

Dankon al ĉiuj pri via fido!

*Raportis Françoise Lemonnier,  
nova sekretariino de la asocio  
lemonnier.francoise ĉe akeonet.com*

## Lastaj novaĵoj: la vivo de nia grupo

### Estrara kunveno / Réunion de Bureau

**En Esperanto:** Baldaŭ okazos pro diversaj demandoj faritaj ene de la estrarano Estrara kunveno. Tion oni aranĝos verŝajne (laŭbele plej frue) iun tagon antaŭ la februara gasta kunveno okazonta la 3an de la monato. Pri tio ni sciigos vin plej baldaŭ, kiam dato estos decidita.

**En franĉais:** Il y aura pour cause de diverses questions faites au sein de l'asso-

ciation une Réunion de Bureau.

On organisera vraisemblablement cette réunion le plus tôt possible, en tous cas si possible avant la réunion conviviale du 3 février. On vous tiendra au courant bien-tôt, dès qu'une date sera décidée.

*Cyrille kaj Daniel*

### Réunion conviviale: les repas

**En franĉais:** Daniel souhaite que vous le mettiez au courant de votre participation à

un repas lors d'une réunion conviviale au minimum avant le dernier dimanche au soir précédant la réunion? Nous avons par le journal toujours demandé que cette annonce se fasse avant le mercredi, mais comme Daniel doit passer ses commandes le lundi, il faut absolument le mettre au courant avant le lundi.

Autre point important: afin de ne pas commander «au pif» les repas à chaque fois comme c'est le cas encore actuellement, il

nous pensons important pour l'association et son organisation que chaque personne signale **réellement** sa participation à chaque repas (comme c'était d'ailleurs prévu à l'origine) afin qu'il n'y ai plus de comande en trop, de gaspillage, etc. Cette question sera à voir lors de la Réunion de Bureau à venir et à préciser au membres quant à son application effective.

*Cyrille d'après Daniel*

### **Les projets: d'abord finir la cassette et puis avancer vers d'autres horizons**

**En français:** Moi (Cyrille) et Daniel avons comme objectif que l'association ai des buts bien marqués, des projets de travail pour montrer la puissance de l'espéranto, son utilité, la faire vivre (un sujet de prochaine réunion de bureau et conviviale). L'un des projets en cours et qui a d'une certaine manière abouti est le doublage de la cassette vidéo sur la Baie de Somme que certains ont pû savourer en intégralité lors de la précédente réunion conviviale.

Daniel souhaite, que cette cassette qui a été faite selon ses dires à la va-voite avec seulement 3 voix au lieu de 5 ou 6, soit totalement réenregistrée au niveau des voix et revue au niveau de la traduction.

La révision de la traduction pourra être faite par travail en groupe (selon possibilité) ou aussi par un travail de relecture de chacun chez soi par le biais d'un document word ou d'une impression papier que nous fournira Daniel à la rentrée.

Une date a été fixée pour re-fixe les voix sur support numérique le 20 janvier 2006. Venez nombreux nous prêter votre voix, contactez Daniel pour lui proposer!!!

*Les membres présents lors de la dernière réunion conviviale*

### **Françoise avinjo**

Françoise Lemonnier sendis al mi fine de aŭgusto tiun ĉi novaĵon:

«Mi estas forgesinta diri al vi ke mi estas avinjo ekde la 26a de *Mégane*, kiu estas la pli bela nepino de la tuta mondo!»

Dum lasta gasta kunveno membroj arigis monon por donaci al ŝi por ŝia nepino.

Bonan vivon kaj ĝojon al *Mégane* kaj ŝiaj gepatroj kaj avinjo.

*Laŭ informo de Françoise*

### **Pri Claudine kaj Christian**

Ĉi tiun jaron Claudine kaj Christian translokiĝis en alian kvartalon de Amieno (antaŭe ili loĝis en la strato Jean Moulin kaj poste translokiĝis al la strato Jean Jaurès).

Plie, sed ne malplej grava: ili antaŭ nelonge geedziĝis.

Ni deziras al ili bonan daŭrigon kaj ĉion agrablan.

*Laŭ informo de Daniel Devis*

### **Pri Christelle**

Christelle Rimette plu loĝas en Parizo, sed havas kelkajn problemojn pro nelaboreco.

Bonan novaĵon: ŝi estas graveda, kaj naskos baldaŭ bebon (dato nekonata).

*Laŭ informo de Bernadette (kaj aliaj)*

### **Silvestra nokto ĉe Danielhejmo**

Daniel Devis planas kun Maryse okazigi en sia domo noktan festenon dum la novjariĝa nokto de la 31a de Decembro.

Ili estus ŝatonta fari ĝin le la salono «la Tilioj» en Salüelo, kaj petis ĝin pere de Jean-Claude. Sed bedaŭrinde, Jean-Claude ne ricevis konsenton de la urbodomo de Salüelo.

Kiu eble venos?

Certe Daniel kaj Maryse, Danielle Dolle kun sia edzo, Françoise kaj Luc Jaisson, Françoise Lemonnier kun sia edzo, Bernadette Manier, eble Nelly Carpentier, Danielle Hartman kaj fratino kaj bo-frato de Daniel...

Por pli scii demandu Daniel-on.

*Laŭ informo de Daniel kaj Jean-Claude*

### **Pri IUTA la 23an de Januaro**

IUTA estas la acronimo de la franca nomo «Institut Universitaire Tous Âges» (Ĉiu-Aĝa Universitato-instituto). En salono Dewailly la 23an de Januaro okazos prezentado de Esperanto.

*Laŭ informo de Jean-Claude, Daniel kaj Bernadette*

### **Cyrille en Treviro**

De la 27a de Decembro ĝis la 3a de Januaro Cyrille ĉeestos en Treviro ĉe la Internacia-Festivalo, okazonta ĉi-jare en Treviro (Trier germane, Trèves france).

Ĉi tie li renkontos kaj festados kaj festenados kun pli ol cent kvindek esperantistoj en tuta Eŭropo, kaj eĉ el pli foraj landoj. Okazos vizitado de Treviro, kulturaj aranĝoj, vizitado de Luksemburgio, ktp.

Kompreneble li rakontos ĉion reveninte la 6an de Januaro.

*Laŭ informo de Cyrille*

### **Baldaŭaj raportoj**

Daniel, Bernadette kaj Maryse verkis tag-jurnalon dum sia ĉeestado en Nederlando Fine de Majo kaj komence de Junio.

Nun iliaj tekstoj estas pretaj, entajpitaj, ktp. Ili kunvenis kun Cyrille antaŭ ne longe por scii kion el tiuj ĵurnaloj fari. Estis decidite eldoni ĝin perkomputile laŭ programar-formato PDF (la sama ol tiu uzata por

Okdek-anoj ĉe l' Papero). Ĝi aperos pro impoenco de la tekstoj kaj kvanto de fotoj dise de la serio Okdek-anoj ĉe l' Papero.

Nur nun necesas tempo, por ke Cyrille enpaĝigu ĝin per siaj programaroj.

Siaflanke Cyrille preparis raporton koncizan pri sia ĉeesto en Prago, Krakovo kaj Budapeŝto dum somero 2005.

Ĝi, pro ties nur unu-paĝa longeco, aperos en Okdek-anoj ĉe l' Papero kun fotoj aŭ ne.

*Laŭ informo de Cyrille kaj Daniel, Bernadette, Maryse*

### **AGORA 2005**

Ĉi-jare, kiel lastajn jarojn, AGORA okazis en Mégacité. Sukcese disvolviĝis ĝi. Oni starigis por ni budon en ne tre frekventita loko de la salonego, sed tamen ricevis multajn preterpasantoj kaj vizitantoj. Ni organizis specialan ludon por la vizitantoj, al kiu estis petite respondi kelkajn facilajn demandojn pri Esperanto. Des pli facilaj estais la demandoj, ke ni montris al ili la respondojn!!!

Kelkaj gajnis premion, sed bedaŭrinde, neniu petis al ni ilin. :-)

Venont-jare tian specialan ludon oni organizos kaj espereble tiamaj ludintoj venos por obteni siajn premiojn.

*Cyrille*

### **Morbecque 2005**



**Marie-Thérèse, unu el niaj novaj komencantinoj venis por ĝui la etoson...**

Kiel kutime la NordFranca Eŭropa Esperanto-Rendevuo (Morbecque) okazis la unuan semajno-finon de Novembro.

En ĝin inskribiĝis Françoise Lemonnier, Bernadette, Mi (Cyrille), la paro Jaisson kaj Marie-Thérèse, nova lernantino de Esperanto ĉe la unua nivelo.

Estis 5 grup-studoj (2 niveloj por progresantoj). Ĉiu aliĝis laŭ siaj kompetentecoj aŭ deziroj al la taŭga grupo.

Kio okazis ĉi-jare? Ni ĉeestis dum kursoj, manĝis ktp. Cetere sabaton vespere kantis Esperante kaj france Frabrice Morandau el Parizo. Li estas blinda kantisto, kiu plie akompanas sin per akordiono. Lia stilo estas



tre franc-kanzona, eĉ breton-stila. Dimanĉon ptm. Michel Dechy prelegis pri Tinĉjo en Esperanto: «La konjugacio laŭ Tinĉjo». Tiun ĉi prelegon li prezentas kaj kongruigas al la ĉeestantaro: kun francoj li prelegas france kaj pli emfazas kelkajn punktojn por prezenti Esperanton: li uzas Tinĉjon, kiel komunikilo. Kun Esperantistoj, li ne informas, kompreneble pri Esperanto. Ĉar jam bone konas Esperanton Esperantistoj. Do oni povus diri ke li inventis bonan metodon por anigi siajn pasiojn en unu prelegon. Sukcese!



Fabrice Morandeu kantis por ni en Esperanto kaj en la franca lingvoj.

Michel afable donacis al ni pakon da «Tinĉjo en Tibeto» pro ĝia frateco kun la Norda Federacio (kvankam Esperanto 80 ne estas membro-asocio de la Federacio sed asocio). Li deziras per ili, ne ke ni vendu ilin al personoj intersetataj aŭ disdonu al la membroj po unu, sed, ke ni uzu ilin, kiel varbilojn, ekz. por prezenti la lingvon en la lernejoj, ĉe la neesperantisaj asocioj, ĉe la ĵurnalistoj, ktp.

Tion ni kune pridiskuti por scii kion konkrete oni faros per ili.

Notu bonege: Se venontan jaron, vi deziras partopreni je la Rendevuo, mi deziras atentigi vin pri la datoj. Ne la unuan kutiman semajno-finon de Novembro okazos la Rendevuo en 2006, sed le duan aŭ la trian. Tion oni sciigos al vi sufiĉe frue por ne erari pri la datoj (vidu la TTT-ejon pri ĝi).

Cyrille

### Zamenhof-Tago en Araso

Arras-Esperanto kaj la federacio Esperanto-Nord okazigis elstaran prelegon por kune celebri La Zamenhofan Tagon la 17an de Decembro (Z-tago okazas fakte la 15an de Decembro, sed estis pli taŭga la elekto de sabaton anstataŭ jaŭdon).

Gastigis nin la prezidanto de Arras-Esperanto Edmond Plutniak.

Estis invitita por prelegi Willy Koukouvi, juna esperantista togolandano el «mina» etno, nun studento en Parizo. La temo de lia prelego estis «Esperanto: lingva solvo por Afriko».

Willy komence klarigis al la ĉeestantaro sian historion, sian konatiĝon kun Esperanto, kiun li malkovris per malnova metodo el la XIXa jarcento ie trovita sur seĝo forlasita de iu en trajno.



Willy Koukouvi post prelego...

Poste li prelegis kaj komunikis al ni sian opinion pri la bezono de Esperanto por helpo al progresigo de Afriko al unuiĝo kaj kunlaboro.

Li ankaŭ argumentis pri la elekto de Esperanto, spite la ekzisto de aliaj potencaj lingvoj (la eks-koloniaj, aŭ la svahila, ktp.).

Li opinias ilin ne sufiĉe neŭtralaj aŭ tro malfacilaj.

Post demando pri zamenhof-stila artefarota afrik-devena lingvo Willy opinias, ke Esperanto pro ĝia internacia eco estas la plej taŭga ilo por malfermi la mensojn de afrikanoj al la mondo ne Afrika kaj por interkomuniko inter popoloj de Afriko el etnoj disigitaj pro nombreco de lingvoj (nun ekzistas 1300 lingvoj en Afriko).



La vespero finiĝis en armena restoracio situanta en strateto de la urbo apud la *Grand Place*. La etoso estis varmega. Kelkaj eĉ dancis. Por ni dancis ventrodancistino!

Por pliaj informoj pri la vespero kaj la asocio Arras-Esperanto: <http://arrasesperanto.free.fr>



Cyrille

### Lasta grava novaĵo: Ĉu baldaŭ kubanino en Amieno? Espereble!!



Martitza dum prelego

Ni lernis antaŭ nelonge, ke baldaŭ vojaĝos tra nia regiono kubanino.

Ŝi nomiĝas estas Maritza Gutierrez.

Jen kelkaj vortoj de Yves Nicolas pri ŝi:

«Maritza estas estraranino de UEA pri *Landa agado*. Ŝi estas parolistino ĉe Radio Havano. La prelegvojaĝo komenciĝus la 3an de aprilo post kunveno en Roterdamo, dum principe du, maksimume tri, semajnoj (konfirmota). Ŝi pretas prelegi pri Esperanto-movado en Kubo, pri Radio Havano, kaj Kubo ĝenerale, en la orienta parto de Francio: Nordo, *Pikardio*, Francilio, Champanjo-Ardenoj, Loreno, Alzaco, Burgonio, Auvernjo, Franc-konteo, Rodan-Alpoj, Suda Francio-Pireneoj, Langvedoko, Provenco-Alpoj-Lazura Marbordo.»

Daniel jam proponis la kandidatiĝon de nia asocio al Yves Nicolas. Li estas la respondeculo pri aferoj de turneo de esperantistoj tra Francio.

Dank' al li ni jam ricevis Mikaelo Bronŝtejn, Gražena Opulskiene kaj Madis Linnamägi... Ĉu baladaŭ ni ricevos kubaninon?

Pri tio, kiel oni diras en la franca: ni interplektu la fingrojn!

Cyrille

### Esperanto 80 à l'InterSEL?

Ni ricevis proponon de Françoise Maréchal pri ĉeesto de Esperanto dum la InterSEL 2006, kiu okazos en Amieno. Jen ŝia mesaĝo:

«(Albert) sera de passage (très furtif) sur Amiens pour le week-end des 15 et 16 octobre car le SEL organise (...) la première réunion de préparation des rencontres nationales 2006 qui auront lieu à Amiens, du 19 au 27 août 2006. (...).

D'ailleurs, je sais qu'un atelier Esperanto aura lieu durant ces rencontres et ce serait bien que vous soyez présents - en tant qu'extérieurs au SEL - pour y mettre VOTRE propre GRAIN de SEL. Ça pourrait être très sympa.»

Kion vi opinias pri tiu ĉi propono?

Cyrille